

Suspektaj Kunvojaĝantoj

Sur nia vojo reen ni iĝis al la sama direkto el kiu ni estis venintaj, kaj tial ne havis kaŭzon tiel zorge ekzameni la regionon, tra kiu ni rajdis, kiel ĝi estus estinta necese, se ni ne estus koninta ĝin. Sed tio ne signifis, ke ni neglektis la gardiĝon, laŭ kiu la okcidentulo agas eĉ je lokoj, kiujn li konas kiel sian propran vestopoŝon. Ni ĉiam serĉis spurojn de homoj aŭ bestoj, kaj tiel ni ekrimarkis spuro je la tagmezo, kiun ni alikaze eble ne estis vidintaj, ĉar estis videble, ke oni estis aginta zorgege forviŝi ĝin. Eble ni tamen estus nevidintaj ĝin, se ni ne estus trovintaj ĝin je la loko, kie la kreintoj estis ripozinta kelkan tempon, kaj la herbaro, kiujn ili estis premintaj malsupren, ankoraŭ ne rerektiĝis. Ni haltis kaj deĉevaliĝis pro ekzameni la spuron. Intertempe Rollins alvenis kaj saltis de la selo pro rigardi la premsignojn.

„Ĉu tio estis farita de homo aŭ besto?“ li demandis dum tio.

Winnetou ne respondis; sed mi klarigis:

„Vi ŝajnas esti nesperte pri la spurolegado. Jen ja jam la unua alvido ekkonigas, kiu estis tie ĉi.“

„Do certe homoj, ĉu?“

„Jes.“

„Tion mi ne kredas, ĉar tiukaze la herboj estus dispiedbatitaj multe pli.“

„Ĉu Vi opinias, ke ĉi tieas homoj, kiuj sentas plezuron pri disbati la teron, pro poste esti trovata kaj neigata?“

„Ne. Sed kun ĉevaloj tute neebliis kaŭzi pli klarajn spurojn.“

„La personoj, kiuj estis tie ĉi, ne havis ĉevalojn.“

„Neniujn ĉevalojn, ĉu? Tio estus eminenta, eble eĉ suspektinda. Mi pensas, ke en tiu ĉi regiono neniu homo povas travivi sen sia ĉevalo.“

„Estas ankaŭ mia opinio. Sed ĉu Vi neniam antaŭe spertis aŭ aŭdis, ke iu perdis sian ĉevalon per ia maniero?“

„Sed jes, certe. Sed Vi ne parolas pri ne unu, sed pluraj homoj. Unu povas perdi sian ĉevalon, sed pluraj homoj nur malfacile.“

Rollins ŝajnis esti saĝa, kvankam li ŝajne havis tute neniun sperton. Mi ne estus respondinta al li, eĉ ne, se mi tiumomente ne estus demandita de Winnetou:

„Ĉu mia frato scias, kion li pensu pri tiu spuro?“

„Jes.“

„Tri palvizaĝoj sen ĉevaloj. Ili ne portis pafilojn, sed bastonojn en la mano. Ili foriris de tie ĉi, per ke unu paŝis sur la premsignojn de la alia, kaj la lasta en la vico provis forviŝi ilin. Ili do ŝajnis supozi, ke ili estas sekvataj.“

„Tio ŝajnas ankaŭ al mi. Ĉu ili eble havas tute neniujn armilojn?“

„Certas, ke tiuj tri blankuloj ne havas pafilojn. Ĉar ili ripozis tie ĉi, ni alikaze devus trovi la premaĵojn de iliaj armiloj.“

„Hm! Strange! Tri senarmilaj palvizaĝoj en ĉi tiu danĝera regiono. Oni povas klarigi nur tiel ke tiuj homoj havis malfeliĉon, eble estis atakitaj kaj elrabitaj.“

„Mia frato Ŝarlih tute havas mian opinion. Tiuj homoj apogiĝis sur bastonojn, kiujn ili derompis en la arbaro, kaj kiujn ili puŝis en la teron dum la ripozo. Oni klare vidas la truojn. Certe ili bezonas helpon.“

„Ĉu Winnetou volas, ke ni sekvu ilin?“

„La ĉefo de la apaĉoj ŝate helpas al ĉiu, kiu bezonas lin, kaj ne demandas, ĉu estas blankulo aŭ ruĝulo. Sed Old Shatterhand decidu, kion ni faru. Winnetou volas helpi, sed li ne havas konfidon.“

„Kial ne?“

„Ĉar la konduto de tiuj palvizaĝoj estas ambigua. Ili ege klopodis forviŝi la pluirantan spuron. Kial ili ne same forigis la premaĵojn tie ĉi je la restejo?“

„Eble ili pensis, ke ili ne havis tempon pro tio. Aŭ: ke ili restadis tie ĉi, tio povis esti scieble, ili volis nur kaŝigi, kien ili iris poste.“

„Povas esti tiel, kiel mia frato diris. Sed tiukaze la viroj ne estas okcidentuloj, sed senspertaj homoj. Ni rajdu post ili pro helpi al ili.“

„Mi ŝate konsentas, ankaŭ ĉar ne ŝajnas, ke ni ne devas troe flankeniĝi de nia direkto.“ Ni resurĉevaliĝis. Sed Rollins hezitis kaj pripense komentis:

„Ĉu ne estus pli bone lasi la homojn al si mem? Ja ne povas utili al ni rajdi post ili.“

„Certe ne al ni, sed al ili“, mi kontraŭis.

„Sed ni perdos tempon per tio.“

„Ni ne hastu tiel, ke ni ne povus helpi al homoj, kiuj verŝajne bezonas ĝin.“

Mi diris tion iomete akre. Li malgaje grumbli kelkajn vortojn en sian barbon kaj surĉevaliĝis pro sekvi nin, kaj ni rajdis laŭ la spuro. La severecco, kiun li montris hodiaŭ, ĝustis al lia vizaĝo. Mi ĉagreniĝis pri li, kaj sentis eĉ malpli konfidon pri li ol antaŭe, sed mi tute ne ekhavis ideon supozi lin esti tiel inside, kiel li vere estis.

La spuro forlasis la arbaron kaj la randan arbedaron kaj elkondukis al la libera savano. Ĝi estis maljuna, maksimume unu horon, kaj ĉar ni rajdis rapide, ne daŭris longe, ĝis ni

ekvidis la serĉintojn antaŭ ni. Kiam ni ekrimarkis ilin, ili estis ĉirkaŭ unu angla mejlo for de ni, kaj ni estis pasigintaj tiun distancon jam duone, kiam ili ekatentiĝis pri ni. Unu el ili vidis reen, ekvidis nin kaj informis la aliajn. Ili haltis mallongan tempon, ŝajne per ektimo. Sed tiam ili ekkuris, kvazaŭ ĝi koncernis ilian vivon. Ni instigis niajn ĉevalojn. Estis facilaĵo al ni proksimiĝi al ili. Antaŭ ni estis atingintaj ilin, mi vokis al ili kelkajn trankviligajn vortojn, kaj tio havis la konsekvencon, ke ili ĉesis kuri.

Ili estis tute senarmile, ili ja eĉ ne estis posedintaj tranĉilojn pro detranĉi la bastonojn, sed ili nur derompis ilin. Iliaj vestoj estis en bona stato. Unu el ili estis volvinta tukon ĉirkaŭ la supra kapo, kaj la dua havis la brakon en bandaĝa maŝo. La tria estis senvunde. Ili vidis al ni per timaj, malkonfidaj okuloj.

„Kial Vi tiel kuras, *mes'sur:oj*?“ mi demandis, kiam ni atingis ilin.

„Ĉu ni scias, kiu kaj kio Vi estas?“ respondis la plej maljuna el ili.

„Tio egalas. Ni povis esti ajn iu, kiu ni volis, ni estis atingintaj Vin ĉiukaze. Tial Via kurado senutilis. Sed Vi ne afliktiĝu. Ni estas honestaj homoj, kaj raidis post Vi laŭ Via spuro, kiam ni trovis ĝin pro demandi, ĉu ni eble povas fari ion pro Vi. Ni supozas, ke Via nuna nuntempa farto ne estas tute laŭ Viaj deziroj.“

„Jen Vi ankaŭ ne eraris, *Sir*. Ega malfeliĉo okazis al ni, kaj ni ĝojas, ke ni almenaŭ savis la nudan vivon.“

„Kiu do traktis Vin tiel malbone? Ĉu blankuloj?“

„Ho ne, la okanando-suoj!“

„Nu tiuj! Kiam?“

„Hieraŭ matene.“

„Kie?“

„Tie transe apud la supra Cedar Creek.“

„Kiel okaziĝis tio? Aŭ ĉu Vi opinias, ke mi pli bone ne demandu pri tio?“

„Kial ne, se Vi vere estas tio, kion Vi ŝajnas esti, do sinceraj homoj. Se tio estas la kazo, Vi certe permesos, ke ni demandas pri Viaj nomoj.“

„Tiujn Vi aŭdu. Tiu ruĝa *gentleman* tie ĉi estas Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj. Oni kutimas nomi min Old Shatterhand, kaj la tria estas *Mr. Rollins, pedlar*, kiu akompanis nin pro komercaĵo.“

„*Heigh-day*, jen ĉia malkonfido do ekskludendas! Pri Winnetou kaj Old Shatterhand ni jam ofte aŭdis, kvankam ni ja ne povas diri, ke ni estas okzidentuloj. Tiu estas du viroj, pri tiuj oni povas konfidi en ĉia situacio, kaj ni dankas al Dio, ke li kondukis Vin sur nian vojon. Jes, ni treege bezonas helpon, *mes'sur:oj*, kaj Vi meritas la dankon de Dio, se Vi bonvolos iomete agi por nia bono.“

„Tion ni faros. Nur diru, kion ni povas fari!“

„Por tio Vi unue eksciu, kiuj ni estas. Mia nomo estas Evans, tiu ĉi estas mia filo kaj la alia mia nevo. Ni transvenis el la regiono de Neu-Ulm, pro ekloĝi apud la Cedar Creek.“

„Ega nesingardeco!“

„Bedaŭrinde jes! Sed ni ne sciis tion. Ĉio estis priskribita al ni tiel bele kaj facile. Ĝi sonis, kvazaŭ oni bezonis nur transveni kaj akiri la rikolton.“

„Kaj la indianoj, ĉu? Ĉu Vi do tute ne pensis pri ili?“

„Sed jes! Sed oni rakontis pri ili tute alimaniere, kiel ni ekkonis ilin. Ni venis bone ekipite, pro unue vidi al la regiono kaj elekti bonan landopecon. Dum tio ni falis sub la forton de la ruĝuloj.“

„Danku al Dio, ke Vi ankoraŭ vivas!“

„Certe, certe! Unue ĝi aspektis multe pli malbone, ol ĝi tiam realiĝis. La uloj parolis pri la torturofosto kaj aliaj belaj aĵoj. Sed tiam ili kontentiĝis per preni ĉion, kion ni havis, escepte de la vestaĵoj, kaj forpeli nin. Ili ŝajne planis pli gravajn aĵojn ol okupiĝi pri ni.“

„Ĉu pli gravajn aĵojn? Ĉu Vi eble eksciis, kiuj aĵojn tiuj estis?“

„Ni ne komprenas ilian lingvon: sed la ĉefo, kiam li fuŝparolis al ni en la angla, menciis *settler*:on nomata Cropley, al kiuj ili verŝajne celis.“

„Tio ĝustas. Tiun ili volis ataki dum la nokto, kaj tial ili ne havas nek tempon nek emon plue okupiĝi pri Vi. Vi ŝuldas Vian vivon al tiu cirkonstanco.“

„Sed kian vivon!“

„Kial?“

„Tio ĉi ne estas vivo. Ni ne havas armilojn, eĉ ne tranĉilon, kaj ne povas ĉasi aŭ kapti viandobeston. Ekde hieraŭ frue ni manĝis nur radikojn kaj berojn, kaj ankaŭ tio ĉesis tie ĉi sur la prerio. Mi kredas, ke Vi ne estus trovintaj nin, ni certe estus ekmortontaj per malsato. Ĉar mi ja ege esperas, ke Vi helpos al ni per doni al ni iomete da viando, aŭ io simila, ĉu?“

„Tion ni faros. Sed antaŭ ĉio diru al ni, kien Vi nun volas iri!“

„Al Fort Randall.“

„Ĉu Vi konas la vojon tien?“

„Ne, sed ni kredis, ke ni trovis la direkton iomete ĝuste.“

„Tio jes estas la kazo. Ĉu Vi do havas kaŭzon iri tien?“

„Eĉ tre gravan. Mi jam diris, ke ni tri iris antaŭen pro vidi al la regiono. Niaj samfamilianoj postvenis, kaj atendas nin en Fort Randall. Se ni feliĉe povus atingi tiun lokon, ni estus sufiĉe helpintaj.“

„Jen Vi havas bonŝancon. Ni rajdas en la saman direkton, kaj havas bonan kontakton al Fort Randall. Vi povas aliĝi al ni.“

„Ĉu Vi vere volas permesi tion al ni, *Sir*?“

„Certe! Ni ja ne povas simple forlasi Vin tie ĉi!“

„Sed la ruĝuloj forprenis niajn ĉevalojn. Ni do devas iri, kaj tio kostos tempon al Vi!“

„Ne ŝanĝeblas. Nun sidiĝu kaj ripozu! Antaŭ ĉio Vi havu manĝaĵon.“

La helpisto de la *pedlar* ŝajnis ne kontenti pri la okaziĝoj. Li mallaŭte malbenadis, kaj grumblis ion pri tempoperdo kaj senutila kompleteco. Sed ni ne atentigis pri tio, deĉevaliĝis, kunsidis sur la herbaro, kaj eldonis manĝaĵojn al la tri helpobezonantoj. Ili ege ĝuis ĝin, kaj poste, kiam ili estis ripozintaj, ni pluis la interrompitan rajdadon, per ke ni deflankiĝis de nia eksa direkto kaj iĝis al nia praa. Ili ĝojis pri la savigo, kaj ankaŭ ŝate estus interparolintaj kun ni, se ni estus estintaj pli parolemaj homoj.

Winnetou same malpli kiel mi pluigis komencintan nenecesan babiladon. La tri ankaŭ provis paroli kaj rakontigi la *pedlar*-helpiston. Li estis kolera pri nia renkontiĝo kun ili, kaj per tio mi atentigis nun pri li plie ol antaŭe. La konsekvenco surprizis.

Fakte mi rimarkis, ke li, kiam li pensis esti nerigardata, aperis moka rideto aŭ esprimo de malice ĝoja kontentiĝo sur lia vizaĝo. Kaj ajn kiam tio okazis, li faris ekzamenan vidon al Winnetou kaj mi. Mi atentigis plie pri li, dum kio mi kvankam gardiĝis, ke li ne povis rimarki ion, kaj tiel mi eksciis duan aĵon plu.

Fakte Rollins foje rigardis al unu el la tri piedirantoj, kaj kiam la vidoj de la du renkontiĝis, ili ja rapide tuj redirektiĝis alien, sed estis al mi, kvazaŭ speco de kaŝa interkonsento estis fulmetinta dum tio. Ĉu la kvar do interkoniĝis, ĉu ili eĉ interapartenis? Ĉu la repuŝanta konduto de la helpisto do estis nur nura masko?

Sed kiun kaŭzon li povis havi trompi nin? Ĉu mi nur eraris? Evans, kune kun filo kaj nevo ŝuldis dankon al ni.

Strange! La ofte preskaŭ mirakla sameco je sentoj, opinioj kaj pensoj inter la apaĉo kaj mi ankaŭ nun denove rimarkebliĝis. Ĝus kiam mi pensadis pri la menciita rimarkaĵo, li haltigis sian ĉevalon, elseliĝis kaj diris al la maljuna Evans:

„Mia blanka frato iradis sufiĉe longe. Li sidiĝu sur mian ĉevalon. Old Shatterhand ankaŭ pruntos sian ĉevalon. Ni estas rapidaj irantoj, kaj paŝos samrapide kiel la bestoj.“

Evans ŝajnis, kvazaŭ li ne volis akcepti tiun servon, sed finfine akceptis ŝate. Lia filo ricevis mian ĉevalon. Rollins nun fakte estus devinta prunte doni sian ĉevalon al la nevo, sed ne faris tion. Tial la nevo pli poste interŝanĝis kun la filo.

Ĉar ni nun iris piede, ne povis evidentiĝi, ke ni paŝadis malantaŭe. Ni teniĝis tiel malantaŭe, ke la aliaj ne povis kompreni niajn vortojn, kaj krome estis tiel gardiĝe paroli en la apaĉa lingvo.

„Mia frato ofertis sian ĉevalon ne per kompatato, sed per alia kaŭzo, ĉu?“

„Ŝarlih devenis ĝin“, li respondis.

„Ĉu Winnetou ankaŭ rigardis la kvar virojn?“

„Winnetou vidis, ke sia frato Ŝarlih ekmalkonfidis, kaj tial ankaŭ tenis siajn okulojn malfermite. Sed jam antaŭe evidentiĝis al li kelkaj aĵoj.“

„Kiuj?“

„Mia frato divenos ilin.“

„Certe la bandaĝoj, ĉu?“

„Jes. Unu el ili havas bandaĝitan kapon, kaj la alia havas la brakon en maŝo. Tiuj lezaĵoj laŭdire estis faritaj dum la hieraŭaj renkonto kun la okanando-suoj. Ĉu ci kredas tion?“

„Ne. Mi plie kredas, ke tiuj homoj tute ne estas lezitaĵoj.“

„Ili ne estas“, la apaĉo asertis. „Ekde ni trovis ilin, ni pasis du akvejojn, senke ili haltis pro purigi kaj malvarmetigi iliajn vundojn. Sed, se iliaj vundoj estas elpensaj, estas ankaŭ mensogo, ke ili estis atakitaj kaj elrabitaj de la okanandoj. Kaj ĉu mia frato Ŝarlih rigardis ilin dum la manĝado?“

„Jes. Ili manĝis multe.“

„Sed tamen ne tiom kaj tiel haste kiel unu, kiu nur manĝis radikojn kaj berojn ekde hieraŭ. Kaj ili konstatis, ke ili estis atakitaj ĉe la supra Cedar Creek. Ĉu ili povas nun jam esti tie ĉi?“

„Tion mi ne scias, ĉar mi neniam antaŭe estis ĉe la supra Cedar Creek“, mi deklaris.

„Ili povus esti tie ĉi nur, se ili estus rajdintaj. Do ili havas ĉevalojn, aŭ ili ne estis

estintaj ĉe la supra Cedar Creek.“

„Hm! Supoze, ke ili havas ĉevalojn, kial ili malkonfesas tion, kaj al kiu ili donis la ĉevalojn?“

„Tion ni ekzameni! Ĉu mia frato pensas, ke la helpisto de la *pedlar* estas ilia malamiko?“

„Ne; li falsiĝas.“

„Tion li faras. Winnetou ankaŭ vidis ĝin. Rollins konas ilin. Eble li eĉ apartenas al ili.“

„Sed kial ĉiuj tiuj kaŝaĵoj? Kiun kaŭzon ĉi ĉio havu?“

„Tion ni ekzamenos.“

„Ĉu ni ne diru ĉi ĉion rekte en iliajn vizaĝojn, kion ni pensas pri ili?“ mi demandis.

„Ne.“

„Kial ne?“

„Ĉar ilia kaŝemo ankaŭ povas havi kaŭzon, kiu ne estas nia afero. Tiuj kvar viroj ankaŭ povas esti sinceraj homoj, malgraŭ la suspekto, kiun ili vekis en ni. Krome la danĝero, se vere iu estas sur ni, ne jam proksimas. Mia frato Ŝarlih pripensu. Ĉu la helpisto de la *pedlar* havas kaŭzon, plani malicaĵon kontraŭ ni?“

„Plene kaj tute ne. Plie li havas ĉiun kaŭzon kondukti amikece al ni.“

„Tio estas la kazo“, Winnetou kapjesis. „Li volas vidi niajn provizojn. Lia mastro faru bonan negocon kun Old Firehand. Sed ĉi ĉio ne eblas, kiam ia malicaĵo estos farata al ni sur la vojo. Oni neniam ekscios de ni, kie Old Firehand kaj liaj trezoroj troviĝas. Do eĉ se tiu komercisto planas malican agon kontraŭ ni, nenio estas timenda de li, ĝis li estis vidinta la provizojn. Ĉu mia frato konsentas?“

„Jes.“

„Kaj nun pri la tri viroj, kiuj ŝajnigas esti atakitajn koloniistoj!“

„Ili ne estas“, mi enĵetis.

„Ne, ili estas io alia.“

„Sed kio?“

„Ili estu, ajn kion ili volas, tiel longe ni estas survoje, ne endas al ni ekspekti ion malican de ili.“

„Sed eble poste, ĉu? Kiam ni estos atinginta la ‚citadelon‘ kun ili, ĉu?“

„Uŝ!“ Winnetou iomete ridetis. „Mia frato Ŝarlih havas la samajn pensojn kiel mi.“

„Tio ne estas miraklo. Mia supozo estas tiel memkompreneble. Verŝajne ne estas alia ebleco.“

„Ke tiuj kvar viroj ĉiuj estas komercistoj, kaj apartenas al la sama aro, ĉu?“

„Jes. Cropley ja diris hieraŭ, ke Braddon, la *pedlar*, laboras jun kvar aŭ kvin helpantoj. Eble la laŭdira maljuna Evans kroma helpisto de Braddon, aŭ eĉ li mem kun du pli junaj viroj. Li estis en la proksimo de la *settlement* de Cropley, kaj Rollins forestis dum la nokto. Li informis sian mastron pri la granda negoco, kiun li povis fari, kaj la *pedlar* kuniĝis al ni kun du aliaj helpantoj.“

„Sed per kiu intenco? Ĉu bona aŭ malica? Kion pensas mia frato Ŝarlih?“

„Hm, mi volas aserti la duan. Se la intenco ne estus malica, ĝi nur povis esti aliĝi al ni kun malĝusta flago, pro ekzameni la provizojn mem nekonate. Sed tio fakte ne havus utilon, ĉar la helpanto povas fari la ekzamenon same bone, kaj ĉar ni krome

estus permesinta la aliron al la kaŝejo de Old Firehand al la pedlar mem.“

„Tiel ĝi estas. Winnetou tial pensas, ke la tri kun Rollins volas iri al ni, pro vidi al la feloj kaj tiam forpreni ilin de ni senpage.“

„Do ĉu rabo aŭ eĉ murdo?“

„Jes.“

„Mi ankaŭ pensas tion.“

„Estas la ĝusto. Ni havas malicajn homojn ĉe ni. Sed ni ne afliktiĝu sur la vojo. La ago okaziĝu nur, kiam ĉiuj kvar troviĝas en la ‚citadelo‘.“

„Kaj tio estas facile evitebla. Ni kunprenu Rollins:on, tio ne eblas alimaniere. Sed la aliajn ni adiaŭos antaŭe. Ni havas bonan kaŭzon pro tio, ĉar laŭdire ili ja volas iri al Fort Randall al iliaj familioj. Tamen ni ne neglektu nian gardiĝon survoje. Ni ja kredas esti trovinta la ĝuston, sed ankaŭ povas erari. Tial ni rigardu tiujn tri virojn tre detale, ne nur dum la tago, sed ankaŭ dumnokte.“

„Jes“, la apaĉo finigis la interparoladon, tion ni faru, ĉar supozendas, ke iu kun iliaj ĉevaloj ĉiam troviĝas en la proksimo. Ĉiam nur unu el ni dormu. La alia estu vigle kaj bataloprete, sed tiel, ke tiuj homoj ne rimarkas tion.“

Winnetou denove estis trovinta la ĝuston per sia sagaceco, ja la ĝuston, sed tamen ne la tuton.

Ni ne reprenis niajn ĉevalojn dum la posttagmezo, kvankam ili estis ripete ofertitaj al ni. Kiam la vespero komenciĝis, ni plej ŝate estus restintaj sur la libera prerio, ĉar ni tiel estus havinta la necesan ĉirkaŭvidon, kaj povus rimarki la proksimiĝon de mal-amiko pli facile. Sed blovis forta vento, kiu kunportis pluvon, kaj ni estus tute kaj plene malsekiĝitaj. Tial ni preferis tamen plurajdi, ĝis ni atingis arbaron. Je ĝia rando estis kelkaj altaj pinglarboj, kies densaj, vastaj branĉoj estis sufiĉa kovro antaŭ la pluvo. Tio estis agrablaĵo, sub kion ni igis la danĝeron, kiu ja eble ne jam minacis al ni, kaj kiun ni pensis malaltigi per la kutima gardiĝo, se ĝi ekaperus neekspektite.

Nia manĝaĵa provizo estis kalkulita nur por du personoj; sed Rollins ankaŭ kunhavis provizon, kaj tiel ĝi sufiĉis por ni ĉiuj tiun vesperon. Eĉ estis restaĵoj, kaj morgaŭ ni povis ĉasi viandobeston.

Post la manĝado oni fakte devis dormi, sed niaj akompanantoj ne sentis emon pri tio. Ili interparoladis tre fervore, kvankam ni malpermesis al ili laŭtan paroladon. Eĉ Rollins estis estiĝinta parolema, kaj rakontis kelkajn aventurojn, kiujn li estis travivintaj dum liaj komercaj migradoj. Tial ankaŭ al ni kaj Winnetou ne estis dormo. Ni devis resti vigle, kvankam ni ne partoprenis en la interparolado.

Tiu interparolado ŝajnis al mi ne tute perimpulse. Ĝi vekis en mi la impreson, kvazaŭ ĝi estis farita tute intence en tiu maniero. Ĉu eble nia atentiĝo pri la proksimo estu mal-altigata? Mi rigardis Winnetou:n, kaj vidis, ke li havis la saman penson, ĉar li tenis ĉiujn armilojn, ankaŭ la tranĉilon prenprete, kaj garde rigardis al ĉiuj direktoj, kvankam nur mi, kiu konis lin, rimarkis tion. Liaj palpebroj estis levitaj, tiel ke ŝajnis, kvazaŭ li dormis. Sed mi sciis, ke li prizorge rigardis ĉion en la proksimo tra la okulharoj. Kaj mi faris la saman.

La pluvo estis ĉesiĝinta, kaj la vento blovis ne plu tiel forte kiel antaŭe. Plej ŝate ni nun estus transigitaj la restejon sur la liberan ebenaĵon, sed tio ne povis okazi, senke

ni vekis dubon aŭ kreis kontraŭon. Tial ĉio restis, kiel ĝi estis.

Fajro ne brulis. Ĉar la regiono, en kiu ni troviĝis, estis tiu de la malamikecaj suoj, ni estis havinta bonan pretekston malpermesi la bruligon de flamo. Fajro certe povus malkaŝi nin ne nur antaŭ la ruĝuloj, sed ankaŭ antaŭ la ebla kunulo de niaj akompanantoj, kaj ĉar niaj okuloj estis kutimiĝitaj al la malheleco, ni havis la certecon ne nur aŭdi, sed ankaŭ vidi ĉiun proksimiĝadon. La aŭdado sed estis intertempe malfaciligata per la interparolado. Sed niaj okuloj des pli estis viglaj. La sento de venanta malbono, kiu pasigis nin preskaŭ kiel sentebla venteto ĉiukaze vigligis niajn sensojn.

Ni sidis, kiel dirite, sub la arboj sur la arbara rando kaj tenis la vidon direktite al la arbedaro, ĉar estis supozinda, ke, se la malamiko proksimiĝus al ni, li farus tion de tiu flanko. Tiam videbliĝis la maldika serpeto de la luno, kaj ĵetis ĝian malhelan lumon tra la branĉoj, kiu estis super ni. La interparolado ankoraŭ estis daŭrigata senĉese. La vortoj ja estis celitaj ne rekte al ni, sed tamen ne estis miskompreneble, ke nia atento estu malaltigata kaj deflankigata. Winnetou kuŝis nun longe elstreĉite sur la tero, kun la maldekstra kubuto sur la herboj, kaj la kapo tenite per la mano. Tiam mi rimarkis, ke li malrapide kaj mallaŭte ĉiam pli proksime tiris la kruron al la korpo, tiel ke la genuo formis malakran angulon. Ĉu li do planis fari genupafon, la elstare malfacilan genupafon, kiun mi jam priskribis je alia loko?

Jes vere! Li ekprenis la kolbon de sia arĝentopafilo, kaj metis la tubojn, ŝajne sentence, nur ludante, malproksime laŭ la femuro. Mi vidis en la direkton de la tuboj, kaj vidis kvar arbojn for de ni arbedaĵon, inter kies branĉoj malhela brileto videblis, kvankam nur videble al viro de la speco kiel la apaĉo.

Estis du homokuloj. Tie en la arbedaĵo estis iu, kiu rigardis nin. Winnetou volis pafi al li sen ia evidenta moviĝo per la genupafo meze inter la okulojn, kiuj sole estis rimarkeblaj. La tuboj ĉiam pli malrapide leviĝis, tiam ĝi direktiĝis al la celo. Streĉe mi atendis la sekvan momenton. Winnetou neniam mistrafis, eĉ ne nokte kaj per tiu malfacila pafmaniero. Mi vidis, ke lia fingro tuŝis la lanĉilon. Sed li ne pafis. Li deprenis la fingron kaj mallevis la pafilon, pro rerektingi la kruron. La okuloj estis malaperintaj.

„Saĝa viro!“ li direktis mallaŭte al mi en la lingvo de la apaĉoj.

„Iu, kiu almenaŭ konas la genupafon, ankaŭ kiam li eble ne kapablas ĝin“, mi mallaŭte respondis en la sama lingvo.

„Estis palvizaĝo.“

„Jes. Sio, kaj nur tiuj estas tie ĉi, neniam tiel tenus siajn okulojn tiel malvaste. Ni nun scias, ke malamiko estas en la proksimo.“

„Sed li ankaŭ scias, ke lia ĉeesto estis malkaŝita.“

„Bedaŭrinde jes. Li rimarkis ĝin per tio, ke ci volis pafi al li, kaj nun li ege gardiĝos.“

„Tio ne utilos al li, ĉar Winnetou kaŝiros al li.“

„Ege danĝere!“ mi avertis. „Li rimarkos tion tuj kiam ci forigas de tie ĉi.“

„Pshaw!“ Winnetou kontraŭis. „La apaĉo pretekstos, ke li volus viziti la ĉevalojn. Tio ne evidentiĝos.“

„Pli bone lasu min fari tion“, mi petis.

„Ĉu Winnetou sendu cin en la danĝeron, ĉar li evitas ĝin? Li rimarkis la okulojn pli frue ol ci, do havas la antaŭan rajton ekkapti la viron. Mia frato nur helpu al la apaĉo, ke li povas foriĝi neevidentiĝe.“

Per tiu postulo mi atendis kelkan tempon, kaj tiam turniĝis al la ankoraŭ per ilia interparolado okupiĝantoj:

„Nun ĉesu! Ni ekrajdos morgaŭ frue kaj nun dormu. *Mr. Rollins*, ĉu Vi bone fiksligis Vian ĉevalon?“

„Jes“, la demandito respondis, kolerete pri la ĝeno.

„Iltŝi ankoraŭ liberas“, Winnetou diris. „La apaĉo iros pro meti katenojn al ĝiaj kruroj, pro ke ĝi povas paŝtiĝi dum la nokto. Ĉu mi metu la katenojn ankaŭ al la ĉevalo de sia frato Ŝarlih?“

„Jes“, mi konsentis, proke ĝi ŝajnis, kvazaŭ vere priis la ĉevaloj.

La apaĉo malrapide leviĝis, metis sian Saltillo-kovrotukon sur la ŝultron kaj foriris, pro forkonduki la ĉevalojn kelkan distancon. Mi sciis, ke li tiam estus kuŝiĝonta sur la teron kaj rompontata al la arbaro. Dum tio li ne bezonis sian kovrotukon. Li nur estis kunpreninta ĝin pro trompi la rilaton.

La interrompita parolado nun estis daŭrigata. Unuflanke tio karis al mi, aliflanke malkaris. Mi ne povis aŭskulti kion Winnetou faris, sed li ankaŭ ne povis esti aŭdata de tiu, al kiu li kaŝrampis. Mi mallevigis la palpebrojn kaj agis, kvazaŭ mi okupiĝis pri nenio, sed detale rigardis la rando de la arbaro.

Pasiĝis kvin minutoj, dek minutoj, gi estiĝis kvarona horo, eĉ preskaŭ duona. Mi komencis afliktiĝi pri Winnetou. Sed mi sciis, kiel malfacile la kaŝrampado estis sub tiuj kondiĉoj, kaj kiel malrapide ĝi povas okazi, se estas al malamiko, kiuj havas akrajn sensojn kaj eĉ antaŭscias, ke li estu atakata. Tiam finfine mi aŭdis paŝojn flanke malantaŭ mi, do el la direkto, al kiu la apaĉo estis foriĝinta kun la ĉevaloj. Mi turnis la kapon kaj vidis lin veni de malproksime. Li estis resurmetinta la kovrotukon. Verŝajne li estis sukcesinta venki la kaŝiĝintan malamikon. Kun malpezigita koro mi reenturnis la kapon pro trankvile atendi, ĝis la apaĉo estus kuŝiĝinta flanke de mi. Liaj paŝoj proksimiĝis. Malantaŭ mi li haltis, kaj vokis fremda voĉo:

„Nun tiun!“

Rapide reenturnigante mi ja vidis la Saltillo-tukon, sed la viro, kiu estis surmetinta ĝin pro trompi min, ne estis Winnetou, sed barbhava viro, kiu ŝajnis konate al mi. Li estis parolinta la du vortojn, kaj resvinginta la pafilan kolbon pro bati min. Fulmrapide ĵetiĝante flanken, mi provis eskapi la baton. Sed jam estis tro tarde. Li trafis min, ja ne sur la kapon, sed sur la nukon, do je eĉ pli danĝera loko. Mi tuj estis paralizita, kaj ricevis duan bategon sur la kranion, tiel ke mi perdis la konscion.